

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Francalandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 25 fkoj
Bonfara : 30 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MAJO - JUNIO - JULIO - AŬGUSTO

1977 3 - 4

KULTURAJ KAJEROJ

1977 MAJO-JUNIO-JULIO-AŬGUSTO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

La Baugé-regiono, laŭ verdaj vojoj

La ŝippereoj ĉe « Horn » (fino)
Thorbergur Thordarson
trad. Stefan Sigurosson

Mezepokaj manuskriptoj romanikaj

La lando de Reĝino Maud (fino)
Zorja Danovskaja

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn kaj kritikojn.

El Grésillon

Antaŭ unu jaro, en tiu monato junio, jam flaviĝis la herbo, duonsekiĝis la riveroj, serĉis ombron la homoj. Ĉi jare la herbejoj verdas, la riveroj superfluas, la homoj serĉas sunradiojn. Antaŭ unu jaro, en julio, pli ol cent gesamideanoj pli emis al ripozo sub la branĉoj ol al ĉeesto en la kursoĉambroj. Ĉi jare, kio okazos en julio ? Nur unu fakto estas konata : denove ĉeestos pli ol cent personoj. Jam de kelkaj semajnoj ni estas devigataj resendi aliĝojn malfruajn kaj informi bonajn amikojn, ke ne restas eĉ unu lito libera por la unua periodo. Ankoraŭ pli ol kutime praviĝis la alvoko : « Rapide aliĝu ». La dua kaj la tria periodoj povas akcepti kelkajn pliajn aliĝojn sed nur en komunaj ĉambroj. Jen la situacio la 10-an de junio. Pluraj personoj informiĝis jam en januaro pri nia programo sed nur nun resendas la aliĝilon tiam senditan al ili. Tro malfrue ; ĉar nur la aliĝilo kaj pago de la aliĝkotizo certigas al la petanto rezervadon de ĉambro, ne letero, eĉ frue sendita, esprimanta intencon eĉ precizan.

Tiu nova sukceso de la someraktivaĵoj de la Kulturdomo estas kuraĝiga ne nur por la Domo mem sed ankaŭ por esperanto. Ĉar ĉiujare plimultiĝas la nombro da renkontoj diversaj de esperanto-parolantoj en la mondo. La proponitaj programoj fariĝas pli kaj pli allogaj. Tamen la kulturaj aranĝoj de Gresillon, post 25 jaroj, altiras pli kaj pli grandan nombron da vizitantoj. Ĉu la nombro da esperanto-parolantoj kreskas aŭ ĉu la esperantistoj fariĝas pli kaj pli esperanto-praktikantoj ? Ambaŭ konkludoj estas esperdonaj. Ankaŭ kuraĝiga estas la fakto, ke trideko da gejunuloj vizitos Gresillon en julio. Pliampleksiĝo, plijuniĝo de la movado. Du esperigaj faktoj.

Esperanto tra la Mondo

Esperantodomo en Pisanica (Bulgario) fin-konstruita en 1978

La bulgara registaro disponigis pli ol 500 000 levoj por konstruo de kursdomo en la vilaĝo Pisanica (apud Smoljan). Ĝi estos kvinetaĝa kun vastaj lekciejoj, biblioteko, legejoj, kinejo, dormoĉambroj (po 2-3 litoj), kuirejo, sporta halo, ktp... En ĝi oni instruos la internacian lingvon kaj preparos kursgvidantojn kaj instruistojn. La domo funkcios dum la tuta jaro, ankaŭ por diversspecaj renkontiĝoj, seminarioj, ktp... oni antaŭvidas solenan inaŭguron por la universala kongreso de 1978 en Varna (Bulgario).

La kongreso... 1979

La estraro de U.E.A. decidis jam ke la universala kongreso de 1979 okazos en Lucerno (Svislando), de la 28a de Julio ĝis la 4a de Aŭgusto.

Se vi restadas en Vieno...

Ne manku la viziton de la Internacia Esperanto-Muzeo, en la Hofburg, vizitebla lunde, merkrede, vendrede de la 9a ĝis la 15.30. Tél. : 52 10 415. Aliro sub la granda kupolo, vid-alvide de la imperiestra ĉambro, sur la 3a etaĝo.

Aperas kvarfoje en la jaro « Informilo de la I.E.M. ». Jarabono : 8 respondkuponoj aŭ egalvaloro.

Fine de la jaro : La Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo

Tiu nun tradicia manifestacio okazos de la 27a de Decembro ĝis la 3a de Januaro 78 en Rotenburg ĉe la rivero Fulda. La ĉeftemo estos : « al kiuj celoj ? »

Amatoroj de skiado, de nun notu

La 19a Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno okazos en Grainau, ĉe Garmish-Partenkirchen (FR Germanio), de la IIa ĝis la 18a de Februaro 1978. Inf. J. Weidacher, Schneefinkenweg 11, D 8000 Munchen 82, Germanio.

Ĉiuj geesperantistoj estas fakte kore akceptitaj en tiuj sukcesaj skisemajnoj.

La eldonplano de Hungara Esperanto-Asocio

Ni jam aludis en nia numero 1 de tiu jaro, pri la eldonplano de Hungara Esperanto-Asocio (oni povas aboni en U.E.A. pri la diversaj serioj aŭ aĉeti aparte ĉiun libron).

Post la libroserio I (« Koko krias jam » de Szilagyi, « de paĝo al paĝo » de Tarkony, « Kvarope » (poemoj de la skota skolo), « En maskobalo » de Baghy), startas la libroserio II (« La morto de ĉielarko » de la hungara poeto Ady, « Aventuroj de lia Reĝa Moŝto Stultulo » « la deka fuŝio » reeldono de originala satira verko de F.V. Dorno, « Levu la manojn », kriminala komedio de la sama aŭtoro, « Kain kaj Abel », noveloj de Szathmari, « Libro de romanoj » konigo de 6 originalaj romanoj de « fruaj » esperantistaj aŭtoroj : Vallienne kaj Luyken, redaktita de Benczik).

Krome, estos eldonitaj aliaj libroj, inter kiuj « Gvidlibro por supera ekzameno » de Pechan (reeldono).

Entute 14 libroj en unu jaro.

Novaj aliaj eldonaĵoj

— « La mastro de Korboja », estona amromano tradukita de Benita Kart (verko de la klasikulo A.H. Tammsaare).

— « Francisko de Asizo », de N.G.M. van Doornik, tradukita de E.N. Mulders. Eseo pri la fama sanktulo.

— « La perdita vizaĝo », dek noveloj, de la fantastasciencfikcia ĝenro de la ĉeĥo Josef Nesvabda, tradukita de Stanura.

— « Naskitaj sur ruinoj — Okinavo », originala libro de la japano Masao Miyamoto.

— « Internacia lingvo en eklezio kaj mondo », studo de Jerzy Korytkowski.

— Reeldono de « Vagado sub palmoj » de Jean Ribillard, unu el la plej bonaj esperantaj stilistoj, aŭtoro ankaŭ de « Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud ».

— « Esperanto et Interlingua », tre utila franclingva broŝuro de Edo Bernasconi, en la serio « Studoj » de la svisa kultura centro esperantista.

— « Esperanto programita », tiu lernlibreto por memlernantoj jam aperis en germana, angla, nederlanda, sveda, brazila kaj itala eldonoj.

Libreto por atentigi la skoltojn : « Novaj horizontoj »

Temas pri gvidilo kiu traktas la demandojn de internaciaj kontaktoj inter skoltoj kaj — nerekte — propagandas Esperanton, kaj, fine, donas informoj pri nia lingvo kaj Skolta Esperanto-Ligo. Jam aperis eldonoj angla, franca, nederlanda kaj norvega. Prezo : 1,50 ned. gld. Adreso de S.E.L. : postbus 433, NL - Zaandam, Nederlando, pĉk. 543647.

Apotekistoj, grupiĝu...

Apotekista rondo estas starigita. Se tio koncernas vin, rilatu kun R. Zarzycki, ul. Bieruta 2, PL 76-004, Sianow, Pollando.

...Same por la radioamatoroj

S-ro L. Robel, A. Gooller Sidlung 24, D-8640, Kronach, Germanio, preparas respondilon kaj eldonis liston.

P.I.F. : la pupteatra festivalo.

Tiu subteninda manifestacio okazos, tiun jaron, en Zagrebo kaj Bjelovar (3a - 9a de Oktobro). Rilati kun internacia Kultura Servo, Amruŝeva 5/1, pk 499, YU 41000 Zagreb (Jugoslavio).

Esperantistaj infanoj el 5 landoj renkontiĝis

Inter la 14a kaj la 22a de Majo, en la vilaĝo St-Gérard, ĉe Namur en Belgio, renkontiĝis 148 gelernantoj, 9-11 jaroj kaj 18 instruistoj, por la unua Internacia Lernejo, aranĝita de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (I.L.E.I.), en la kadro de la dua lerneja eksperimento de I.L.E.I. Venis infanoj el FR Germanio, Nederlando, Francio, Belgio, Jugoslavio.

La pasporta Servo por la gejunuloj

Ĉu vi scias ke jam 140 geesperantistoj el 40 landoj akceptas senpagan tranokton hejme de junaj esperantistoj ?

Mendu la liston al J.-M. Cash, 9, rue du Languedoc, F-78690 Les Essarts-le-Roi, Francio. Prezo : 10 FF aŭ intern. respondkuponoj.

Vi povas helpi T.E.S.P.A., la Esperanto-teatro de Parizo

T.E.S.P.A. provas kaj sukcesas prezenti valorajn spektaklojn en la internacia lingvo, sed ĝi bezonas subtenon ĉar tiu agado estas kompreneble multekosta. Vi povas fariĝi simpatianto de TESPA pagante helpan kotizon, laŭvole, de 25, 50 aŭ 100 FF al Fino Gaspard, 10, rue G.-Dupont, 95870 Bezons (Francio).

La Baugé-Regiono, laŭ verdaj vojoj, preter nobeldomoj kaj romanikaj sonorilejoj

Rondirado n° 1a
Michelin - mapo — 64, faldo 12a
Mapoj I.G.N.
1/50.000
Baugé - Longué.

— Survoje al Pontigné (D 141), malnova domo Saint-Michel, eksmalsanulejo (leprosulejo ?). En la valo de la rivereto Couasnon, oni baldaŭ kreos baraĵlagon. Je 3 km., maldekstra vojeto al dolmeno.

— **Pontigné :** spirala turpinto (XVIIa jc) de la preĝejo (XIIa-XIIIa jc) ; tipaj anĵuaj volboj, belaj freskoj (XIIIa-XVIa) kaj skulptaĵoj (kapiteloj) ; altaroj (XVII a jc).

— De Pontigné, malantaŭ la preĝejo, ekiru laŭ la vojo al N 766, kiun vi laŭiros maldekstren 100 m. ; tuj dekstren veturu al « Château de l'Auberdière » tra **la arbaro de Chandelais** (forêt de Ch.). Tuj post la eniro en la arboro, vidiĝas la nobeldomo la Harnière (XVIIa-XIXa jc) kaj la domo de la ĉefforstisto. Admiru la plej belan parton de la arbaro (altaj ducentjaraj fagoj, kverkoj, ktp.).

— Alvenante al la D 58, maldekstren iru ĝis ĉe dekstra flanko, la rajdejo « l'Etrier Baugeois ». Laŭiru la vojon al Bocé (3 km.). Vi povas ĉirkaŭiri la kastelon **l'Auberdière** (XVIIa jc) ; tuliparbo.

— Bocé : haltu sur la placo : kasteleto (XVIa jc) kaj romanika preĝejo.

— Laŭ la D 458, veturu al Le Guédéniau ; ĵus antaŭ la alveno en la vilaĝo, ĉe la vojkruciĝo, jen turo kaj dekstre aperas, inter altaj arboj, la kastelo Monnaie (XVIa-XIXa jc). En la vilaĝo dekstren, denove iru laŭ la D 58. Antaŭ ol forlasi la vilaĝon, vidu, kontraŭ lageto, malnovajn muelejon kaj domojn, survoje al la kastelo.

— Tra arbaro daŭre laŭiru la D 58 al Mouliherne. Post 6 kmj, ĉe la t.n. Croix de Baugé (Kruco de Baugé) maldekstren iru laŭ flanka vojeto al la preĝejo de **Mouliherne.** Tie vi estos ĉe la supra parto de tiu loko. Ambaŭflanke de la vojeto, antikvaj tumuloj kovritaj de arboj. Supre de la gotika sonorilejo elstaras spirala turpinto (1693). Ene de la preĝejo, unuaj provekzempleroj de t.n. anĵuaj volboj. En la apuda entombejo, antikva osarejo. Agrabla promenado tra, la malnovaj stratoj de la malsupra vilaĝo. Sur la kontraŭa deklivo, kastelo La Touche (XVIa js).

— De Mouliherne al la Lande-Chasles, laŭ la D 62, la vojo serpentumas tra arbaro ĝis verda valo, kie, ambaŭflanke de la vojo, elstaras du malnovaj domoj (XVIa jc) kiuj estis la priorejo Vendanger.

— En la **Lande-Chasles,** haltu por ĝui la trankvilecon de tiu vilaĝo : preĝejeto (XIIa jc), malnova parokestrejo (XVa jc), kastelo (XVa-XIXa jc), apuda turo (XIIIa-XVIa jc) ; en la bieno, belaj arboj.


Al Cuon laŭiru la tujan vojon, apud « Tertre Martin » ; dekstre nobeldomo Cussé. La vojo trapasas kulturatan ebenaĵon, kaj denove surmontetan arbaron (pinarboj, filikoj, erikoj) ; antaŭ ol malsupreniri al Cuon, laŭiri maldekstran vojeton al aro da miljaraj kaŝtanarboj (apud la farmbieno « La Grand Ailler »).

— Enirante **en Cuon,** ĉe la lasta vojkurbiĝo, nobeldomo Vaux (XVIa jc). Romanika preĝejo kies tursupraĵo similas pinokonuson. Apud la placo, rimarku malnovajn domojn (XVIIa jc), inter kiuj gastejon kun surŝtona skribaĵo : « AU SOLEIL D'OR... (t.e. Je la ora suno), bona lito, bona manĝo kaj bona vino, tie oni gastigas piedirantojn kaj rajdantojn ». Apuda kastelo La Graffinière (XVIa-XIXa jc) ; belaj arboj.

— De Cuon al Chartrené, je dekstra flanko de la vojo, lageto preskaŭ kaŝita de herboj kaj kanoj : tie loĝas multaj birdoj (anasoj, galinoloj, ardeoj, ktp.) kaj fiŝoj.

— **Chartrené :** preĝejo (XIIa jc) kun centjara tilio, parokestrejo (XVIIIa jc) kaj precipe kastelo (XIVa-XVIIa jc). Apud tiu vilaĝo, t.n. « loges » (loĝejoj) ŝirmitaj de erikaĵa tegmento, kaj nun uzitaj kiel remizoj.

— Al Baugé laŭ la D 60. Antaŭ ol transpasi la fervojon, maldekstren iru al **Vieil-Baugé,** preter la muelejo La Pierre (la ŝtono) ; spirala turpinto kvazaŭ falonta (XVIIa jc) elstaras supre de malnova turo (XI jc) kaj de bela ĥorejo (XIIIa jc). Apude malnovaj domoj kun tipaj tegoltegmentoj.


BAUGÉ
Dolmen
D 141
Pontigné
Chavaignes
Couasnon
N 766
Lasse
Le Vieil-Baugé
La Harnière
Forêt de
Moulin de la Pierre
N 138
L'Auberdière
Carrefour du Roi René
Auverse
Chante Lais
D 58
Bocé
D 458
Le Guédéniau
Monnaie
Chartrené
D 58
Cucé
Vaux
La Graffinière
Cucé
Chataigneraie
La Lande-Chasles
Prieure de Vendanger
D 62
Moulibierne
La Touche

LA ŜIPPEREOJ ĈE "HORN" (fino)

Ingôlfshöfoi estas ĉirkaŭ dektri danaj mejloj (98 km) okcidente de Stokksnes. Tiam je vaĉoŝanĝiĝo la subŝipestro iris kajuten, sed la ŝipestro ekgardis sur la ferdeko. La ŝtormo tiam jam fariĝis fortega kaj ankaŭ tiel okcidenta, ke estis tute neeble eviti albordiĝon per direktado okcidenten. Kontraŭe ili opiniis, ke estus eble atingi ĝis oriente de Stokksnes antaŭ ol la ŝtormego jetus ilin al la sabla bordo, sed oriente de Stokksnes la bordo pli etendiĝas nord-orienten. Tial estus pli facile tie eviti danĝerojn ĉeborde, kiam blovas el sudo. La subŝipestro diris, ke li esprimis al la ŝipestro sian opinion, kiam ili disiĝis je vaĉoŝanĝiĝo, ke ili atingus ĝis oriente de Stokksnes, se ne estus necese malmutigi velojn. Poste ili ekvelis je vivo aŭ morto laŭlonge de la sabla bordo. Sed iomete post noktomezo tiel plifortiĝis la ŝtormego, ke ili ankoraŭ devis malmutigi velojn.

Le rapido de la ŝipo tiam malpliiĝis, sed kontraŭe uragano kaj ondofrapado el sudo puŝis ĝin rapide pli proksime al la malprofundaĵo ĉeborde. Tiel daŭris ĝis la kvara horo en la nokto. Tiam la ŝipanoj subite eksentis, ke la ŝipo staras sur fundo sub blanke ŝaŭmantaj kavaj ondegoj en densa mallumo apenaŭ unu mejlon okcidente de Stokksnes. Tiel fortegaj estis la ondrompaĵoj, ke la ŝipo tuj dispeciĝis dum la nokto.

La homo, kiu estis ricevinta vundon sur la tibikarnon estis la subŝipestro en tiu ŝipo. Li diris, ke la akcidento tiel okazis, ke barelo malligiĝis sur la ferdeko, ruliĝis kaj puŝiĝis al lia piedo. Li havis tukon ligitan ĉirkaŭ la kruro, kiam li venis al Horn. La vundo malrapide cikatriĝis, kaj la subŝipestro devis litkuŝi ĝis en aŭgusto venantan someron. Tiam estis neniuj kuracistoj en la distrikto, kaj estis tial la sola rimedo konsulti bieniston en Hoffell en la komunumo Nes kaj la pastron en Stafafell en la komunumo Lon. La pastro konsilis kreskaĵojn precipe alĉemilon por kuraci la vundon. Kreskaĵoj ne estis haveblaj antaŭ printempo. Sed la printempo estis varma kaj ili kreskis frue.

Tuj en la tago post tiu grandpereiga nokto drivis amase surborden diversaĵoj el la ŝipoj, kiuj pereis dum la tempesto. Ĉio estis senorde miksita altaĵe laŭlonge sur la bordoj ĉirkaŭ Stokksnes, ŝiprompitaĵoj, ligna rubo, ŝnuregoj, hokŝnuroj, veloj, manĝaĵoj kaj kadavroj. Ankaŭ multege da tiaj aĵoj drivis surborden oriente en la komunumo Lón. Sur bordojn ĉe Horn aldrivis entute 28 kadavroj ambaŭflanke de Stokksnes. Plej multaj el ili estis ne difektitaj kaj vestitaj. Tiuj kiuj saviĝis prenis la vestojn de la mortintoj kaj helpis porti la kadavrojn for de la maro. Sed la bienistoj en la komunumo Nes transportis ilin en boatoj trans la lagunon Hornafjorour. De tie ili estis transportitaj al la preĝejo de Bjarnanes por enterigo. Pastro Bergur Jónsson faris la funebran diservon. La 15-an de marto li enterigis dek homojn, la 16-an kvar, la 27-an unu, la 29-an unu, la 4-an de aprilo unu, kaj fine unu la 12-an de decembro en la venanta vintro.

Sur la bordojn en la komunumo Lón drivis almenaŭ inter 30 kaj 40 kadavroj. (La gazeto Pjóoólfur diris 38). Ili estis metitaj sur la kulturitan kampon oriente de la tombejo kaj tie kovritaj. Oni rapide ĉarpentis por ili ĉerkojn el nerabotita ligno, tamen ĉerkformajn. Poste ili estis enterigitaj en sudokcidenta korno de la tombejo. Pli poste printempe oni trovis aldone du kadavrojn drivitajn sur la bordojn de Lón, kaj ili ankaŭ estis enterigitaj en Stafafell. Estas dirite, ke du kadavroj drivis surborden en la komunumo Alftafjorour. En tiu sama printempo surbordiĝis ankaŭ kadavro ĉe Hvalnesskriour oriente de Austurhorn. Ĉi estis tiel pezega pro graseco, ke la trovantoj ne sentis kapablaj porti ĝin trans Hvalnesskriour, kie estas tre mallaĝa rokvojeto apudmare. Tial tiun ĉi kadavron oni enterigis tiuloke. Estas dirite, ke la du malsanaj ŝiprompiĝulo, kiuj postrestis en Horn printempe konis tiun « dikulon ». Ili diris, ke li estis ŝipestro kaj posedis kun aliaj kvin ŝipojn, kiuj ĉiuj pereis. Ili ankaŭ diris, ke li estis alte taksata civitano en sia patrujo. Ili bedaŭris, ke li ne ĝuis enterigon en konskrita tero.

Multaj kadavroj drivis surborden okcidente de Hornafjaroarós. Estis 18 enterigitaj en unu tombo ĉe la preĝejo de Holt, kaj mia informinto pri tio, kiu mem estis unu el la tombistoj opiniis, ke pli multaj kadavroj drivitaj elmare estis portitaj tien por enterigo.

En la 20-a de marto venis Arni Gíslason la prefekto kaj vizitis Horn kaj Papós. Sed la 24-an kaj 25-an de marto li aŭkcie vendis la drivitajn objektojn, kaj ĉio vendiĝis je nur 895 (danaj) taleroj kaj 16 groŝoj.

La ŝiprompiĝuloj 31 laŭ nombre ĉiuj restis en Horn ĝis ili estis transportitaj al Djŭpavogur por de tie ŝipveturi. Ili loĝis en loĝdomo de Eyjólfur, escepte la subŝipestro, kiu estis vundita. Iliaj nutraĵoj estis plejparte manĝaĵoj drivitaj surborden el la ŝipoj, ĉar ne plaĉis al ili islandaj manĝaĵoj. Ili tamen aĉetis iom da pano en Papós, kiu tiam estis komercejo de la distrikto.

Tiuj ŝiprompiĝuloj kutime legis edifan predikon dimanĉe kaj meze en la semajno. Kelkaj kantis kaj antaŭe kaj post la legado, sed unu deklamis, kaj la prediko estis tre mallonga. Tiujn diservojn ili ĉiam okazigis sub libera ĉielo kaj ĉiuj staris nudkapaj dum ili kantis kaj legis. Se knaboj en Horn alvenis kapvestita, la Francoj prenis de ili la kapvestojn kaj konservis ilin ĝis fino de la diservo.

Kelkfoje ili amuzis sin ludante diversajn ludojn. Precipe ili imitante geknabojn en Horn balancis sin sur lignaj tabuloj transverse super bariloj. Ne estis eble diri, ke tiuj homoj estis gajaj, sed ili estis afablaj kaj sinceraj en sia konduto kaj modestaj en rilatoj kun aliaj. Ili estis diversaĝaj. Kelkaj estis junuloj kaj la aliaj havis aĝon ĝis sesdek jaroj.

En tiu printempo malfruis ŝipo al Papós ĝis la 13-a de junio. Tial oni devis transporti la ŝiprompiĝulojn orienten al Djŭpavogur, por ke ili povu sufiĉe frue ricevi ŝipveturon eksterlanden. Bienistoj en Nes transportis ilin al Stafafell en Lón. Ili ekvojagis de Horn la 22-an de marto kun 28 ŝiprompiĝuloj, sed postrestis la du vunditoj kaj unu sana viro por flegi ilin. La aliaj tranoktis en Stafafell. Tie reiris la bienuloj en Nes, sed nun la komunestro de Lón prenis sur sin la transporton per helpo de bienuloj en lia komunumo. Ili kunprenis la Francojn al pastrejo Hof en Alftafjörour. Haraldur Briem komunestro kaj aliaj bienuloj plenumis la transporton al Djŭpavogur. De tie la Francoj ŝipveturis eksterlanden.

Pli poste en la printempo unu el la vunditoj, probable jam sana, foriris de Horn kune kun la fleginto kaj ili ekiris hejmen eble per la ŝipo de Papós. Sed la subŝipestro tiam ne ankoraŭ estis sana. Li devis kuŝi en lito ĝis en aŭgusto kiel antaŭe menciate. Tiam estis laboristo en Horn, kiu nomiĝis Jón Porvaroarson. Li restis ĉe la subŝipestro ĉiam kiam li havis libertempon post kiam liaj samlandanoj foriris, ĉar tiam soleco tedis la alilandulon. Ili distris sin per ludado de iu kartludo, kiun la subŝipestro instruis al Jón. Tiu kunestado donis al ili tiun profiton, ke ili sufiĉe bone komprenis unu la alian antaŭ ol ili disiĝis en la somero.

Iufoje en aŭgusto okazas tiu sensacio en Horn, ke la bienuloj vidas francan militŝipon ankri en Hornsvík rekte antaŭ la bieno. Boato venas al la bordo kaj ses homoj piediras al la biendomoj. Ili estis senditaj por venigi la subŝipestron. Unu el ili estis kuracisto, kaj li esploris la piedon de la subŝipestro. Sed ĉar tiam jam fariĝis malluma nokto, oni trovis konsilinde transporti lin en la ŝipon nur en la posta tago. Tiam li estis apogita sur ĉevalon sur kiu li rajdis al la bordo. Kvankam la vundo estis cikatriĝinta, la piedo ankoraŭ estis senforta pro la longa litkuŝado. Surŝipiĝinte la ŝipanoj direktis la ŝipon for de la bordo.

Nun pasas la tempo ĝis en junio la sekvontan jaron. Tiam oni vidas veni sur Hornsvík la saman militŝipon, kiu estis preninta la subŝipestron en la antaŭa jaro. Nun ĝi kunportis donacojn de la franca registaro al la bienistoj en Horn rekompence pro ilia prizorgado de la ŝiprompiĝuloj. Eyjólfur ricevis ĉiujn imageblajn ĉarpentilojn, tiel kiel rabotstablon, segilojn malgrandajn kaj grandajn, ĉiuformajn foldoĉizilojn, borilojn, rabotilojn diverspecajn k.t.p. Sed ambaŭ bienistoj ricevis okremilan fiŝboaton kun remiloj kaj veloj faritaj en Engey (insulo proksime al Reykjavík). Plie la registaro sendis al ĉiu el tiu du bienistoj medalon kaj ornamitan dankodokumenton, sur kiu estis skribitaj nomoj de la kvin pereintaj ŝipoj. La dokumento de Eyjólfur ankoraŭ pendas en la loĝdomo de Horn. Ĝi estas datita la 31-an de decembro 1873 kaj subskribita de la navigacia kaj kolonia ministerio.

En la jaro 1901 aŭ 1902 estis du boatoj de Eskifjörour (oriente en Islando) en Horn por fiŝkapti. Tiam okazis unufoje, ke fiŝkaptistoj de unu el tiuj boatoj remis al franca skuno, kiu fiŝkaptis tie ekstere. La ŝipestro demandis la Islandanojn, ĉu Eyjólfur en Horn ankoraŭ vivas. Li kore deziris, ke Eyjólfur estus veninta al li sur la ŝipon. Tiu ŝipestro diris, ke li estas unu el tiuj, kiuj saviĝis en la tempesto 1873 kaj tiam ĝuis prizorgon de Eyjólfur en Horn. Tiam li estis ŝipano, sed nun li estis ŝipestro kun blanka hararo.

Jen finiĝas la rakonto pri la ŝippereoj ĉe Horn kaj hompereoj en la nokto antaŭ la sepa de marto en la jaro 1873, kio ankoraŭ restas freŝa en memoro de kelkaj maljunuloj en la distrikto Skaftafellssysla, sed paso de la tempo ŝanĝis al fora legendo en imago de la pli junaj generacioj.

Tiun rakonton mi plejparte skribis en la 14-a kaj 15-a de aŭgusto en la jaro 1933, kiel rakontis Sigurour filo de Eyjólfur. Sigurour farigis 12 jara en la tago post la pereiga tempesta nokto kaj mirinde bone memoras tiujn okazaĵojn.

Thorbergur Thordarson
Stefan Sigurosson tradukis

Mezepokaj manuskriptoj romanikaj

Dum la tuta klasika Antikveco kaj ĝis la 2-a kristana jarcento, la manuskripto estis papirusa bendo ĉirkaŭvolvita sur ligna cilindro ; ĝi povis esti longa je 12 metroj ; oni ĝin laŭlonge partigis en kolonojn aŭ paĝojn kaj oni, laŭ la longo skribis. Por ĝin protekti oni enŝovis la volvaĵon en ujon. Iom post iom oni anstataŭigis la papiruson per pergameno. La lasta Okcident-Eŭropa Akto skribita sur papiruso estas Buleo de la papo Nikolao la I-a por la franca abatejo St-Denis, datumita de la 28-a de aprilo 863 (hodiaŭ en la Naciaj Arkivoj).


La pergamenaj manuskriptoj estas kajeroformaj. La plej antikvaj, konservitaj en bibliotekoj aŭ muzeoj, estas de la 3-a kaj 4-a jarcentoj. La mezepokaj manuskriptoj estis skribitaj por kaj per kleraj personoj ; ili nepre necesis por preĝado, meditado kaj studado. Ili estis kaj ankoraŭ estas altvaloraj pro sia rareco kaj la riĉeco de la miniaturoj, kiuj ilin ornamas. Antaŭ ol esti malgranda pentraĵo, la miniaturo estis nur, komence de vorto, la litero, kies konturoj estis substrekitaj kaj dekoraciitaj per minio ; tiu minio estis la kruda materialo, el kiu oni eltiris la ruĝan inkon.

ONI DEVAS UNUE PREPARI LA PERGAMENON

Ĝenerale la monakoj uzas la ŝaf-felon. Senhaŭtiginte la bestojn, oni lasas la felojn en la rivero dum unu tago ; oni ilin lavas por forigi la malpuraĵojn kaj purigi la lanon. Oni ilin degutadas kaj ilin staplas kun la karna faco ĉiam supre. Poste oni farbas tiun karnan facon per kalko kaj oni duonfaldas la felojn, karne-ĉe-karne. Tiel oni ilin lasas dum 8-15 tagoj. Oni ilin lavas ĉe kuranta akvo, oni forprenas la lanon. Kaj, grava manipulado, oni trempas la haŭtojn en kalkajn banojn de diversaj fortoj. Oni denove lavas ; oni etendas la haŭtojn sur vertikalajn kadrojn ; oni ilin senkarnigas kaj surŝutetas per pulvora kreto por igi la haŭtojn netralasivaj ; dank'al tio la inko ne povos entendiĝi en makulojn ; kaj oni frotas per pumiko kaj per ŝafid-felo por igi la haŭtojn tute glataj. En la unuaj jaroj la pergameno estis dika, kruda, rigida ; iom post iom oni igis ĝin supla kaj delikata.

Poste oni eltrancas la haŭtojn por havigi al si duoblajn foliojn (la bi-foliojn), laŭ la dezirata formato ; ŝafhaŭto mezuras proksimume 90 x 45 x 60 cm. ; tio donas du grand-formatajn bifoliojn (45 x 45) aŭ 4-5 foliojn altajn je 30 cm. Kvarbifolia kajero konstituas oktavon (kvar bifoliojn).

Okaze de publika legado, la leganto, por bone aŭdigi sian voĉon, lokas la libron iom malproksime de si. La literoj devas esti grandaj, tial la biblioj kaj la lekciaroj ofte mezuras 45 x 30 cm. La patristiko-libroj, multaj en la monakejaj bi-



bliotekoj, mezuras de 15 x 25 ĝis 25 x 35 cm. La muzikaj manuskriptoj, kiujn la ĉefkantaro uzas dum la diservoj por gvidi la ĥoron de la monakoj, la ĉartaroj, la obitaroj (listoj de la mortintaj monakoj) estas multe pli malgrandaj.

PAĜO-PREPARADO

Preskaŭ ĉiam la manuskriptoj konsistas el oktavoj ; la du-bifolioj kaj la tri-bifolioj servas por finskribi tekston. Unue necesas limsigni la marĝenojn kaj, laŭ rekta linio, gvidi la manon de la skribisto. Helpe de tranĉileto aŭ de strekilo, aŭ de ruleto, oni pikas, laŭ regulaj intervaloj, la suprajn, malsuprajn kaj laterajn randojn de la bifolio por indiki la longajn skribotajn liniojn kaj kolonojn (kolonoj aperis nur en la 12-a jarcento). La kopiisto grifele kunligas la pikaĵojn, kelkfoje per inko. Antaŭ ol bindadi oni malaperigas per randeltranĉado, la pikaĵojn.

LA SKRIBISTO - LA SKRIBEJO

Tuj kiam la abatejo estas konstruita, oni aranĝas la Skribejon ; ĝi situas apud la hejtejo ; tiu ĉi estas la nura ĉambro hejtita en la tuta abatejo.

Manuskripta miniaturo montras Stan Aŭgustenon sidantan kun la pergameno sur siaj genuoj ; en la maldekstra mano li tenas ian kornon : estas la inkujo. La mezepoka skribisto uzis la anserplumon ; meza fendo igis ĝin pli supla ; ĝi estis pintigita, simetrie por la « onciala » kaj minuskla skriboj, sed bevele (ĝenerale maldekstre) por

la gotika skribo. La inko estis el metalaj aŭ vegetalaj substancoj kaj la nigra inko prezentis tre multajn nuancojn ; oni uzis la ruĝan inkon por la titoloj, la literetoj, la « muŝpiedoj », kape de paragrafo aŭ kape de vortoj kiujn oni volis reliefigi. La skribisto disponas tranĉileton por repintigi sian plumon kaj skrapileton por la necesaj korektoj.

En la komenco, la komunumo partigis sian tempon inter diservoj, konstruado de la abatejo kaj ĝardenado. Malmute da tempo restis por kopii la sanktajn librojn. Tial la unuaj manuskriptoj montras « multajn manojn » ; post 25-35 kelkfoje 42 linioj, alia monako prenis la plumon. La religiuloj pli malpli bone sciis la latinan lingvon ; ja, estis multaj skrapotaj eraroj.

Ĉar la libro-bezono montriĝis granda, la plej lertaj kopiistoj forlasis la manlaborojn kaj restis en la skribejo. Kelkfoje unu el ili diktas kaj ĉiu kopiisto povas skribi sian kajeron, eĉ sian tutan libron. Fremdaj skribistoj venis el aliaj regionoj, kun sia pergameno, por kopii la altvalorajn librojn, kiujn oni ne rajtis elirigi el la abatejo. La ĉefskribisto kontrolis la kopiojn kaj marĝene indikis la farotajn korektaĵojn.

DEKORACIO

Ĉiu abatejo, ĉiu regiono, ĉiu lando, ĉiu jarcento alportis sian propan personecon al siaj manuskriptoj, personaj talentoj kelkfoje markis kelkajn el tiuj manuskriptoj. La miniaturisto inspiriĝis ne nur el la religiaj tekstoj, sed ankaŭ el la skulptaĵoj de la timpano aŭ de la klostro de





la abatejo ; la ĉiutaga vivo ankaŭ gvidis lian manon. Tial, apud Evangelistoj kaj Patroj, la libroj montris la strangajn bestojn de la Romanika Bestaro ; kaj kiam oni proskribis tiujn fantastajn bestojn, estis la triumfo de la geometriaj desegnoj.

Ĝenerale la kopiisto prenis sur sin la simplajn dekoraciojn (rubrikajn literojn, muŝpiedojn). Sed estis specialistoj, kiuj ellaboris la miniaturojn, la literojn ornamitajn aŭ historiitajn, la plenpaĝajn pentraĵojn. Ili loĝis en la monakejo mem aŭ translokiĝis de unu abatejo en alian. La kopiisto lasis malplenan lokon por la ilustrendaj literoj, titoloj kaj paragrafoj ; li indikis en la marĝeno la farotan laboron ; la rubrikisto ruĝinke skribis la titolojn ; la unua inicialo estis pentrita el minio. La miniaturisto serie pentris la figurojn, malplenigante, unu post la alia, la fabo-vazetojn, kiujn li estis antaŭe preparinta. Kiam la dekoracio estis finita, oni klasis la diversajn kajerojn ; la randeltranĉado forigis la pikaĵojn kaj la indikojn de la marĝenoj. La bindisto fabrikis bindaĵon aŭ pergamenan, aŭ lignan, aŭ oraĵan.

LA NASKIĜO EN LA MANUSKRIPTOJ

La unuaj manuskriptoj malofte entenis bildon de Naskiĝo, kvankam ĝi figuris ĉe la skulptaĵoj, la freskoj, la vitraloj.

La plej antikva konata Naskiĝo estas de 1158. Respekte al Maria oni lokis ŝin sur komforta lito, ornamita je drapiraĵo, kio estis signo de riĉeco ; la bebo, firme vindita, levas sian kapon kaj ridetas al sia patrino. En alia manuskripto, la sceno estas pli familia : vartistino donas la vinditan bebon al Maria dum Jozefo preparas la manĝon. Por esprimi la grandecon de Jesuo, la artistoj kelkfoje lokis lin sur alta kolono kun kapitelo. Por montri lian senhavecon ili prezentis lin en stalo sur pajla

kuŝejo, tamen radianta je lumo ; genuantaj anĝeloj, azeno kaj bovo lin admiras ; kelkfoje la du bestoj tirante liajn vindojn, ludas kun la bebo.

LA MANUSKRIPTOJ DE STA MARIA STA JOHANO DE LAON

En 650 la abatino Salaberge, deveninta el granda merovida familio de Aŭstrasio, fondas, en Laon, la monakinejon de Sta Maria - Sta Johano. Iom antaŭ la jaro 750, la monakinoj kreas Grandan Skribejon kiu famiĝis pro la merovida skribmaniero.

La manuskriptoj de la 8-a jarcento estis skribitaj kaj miniaturigitaj de la religiulinoj mem. La plej antikva el tiuj manuskriptoj estas la Libro de la Radoj (79 folioj : 24 x 16). La kopiistino mem faris ĉiujn majusklojn kaj miniaturojn, kiujn ŝi lokis meze de la teksto ; kvar koloroj estis uzataj : la ruĝo-vermiliono, la musko-verdo, la dolĉa malvo, la citron-flavo, tre viva, kiu igas la paĝojn tre lumaj. La inko estas bruna kaj ĉirkaŭstrekas la figurojn. Ok grandaj paĝoj montras didaktikajn desegnojn de Radoj, zorge strekitaj per cirkelo, kaj kiujn akompanas klarigaj, tradicaj surskriboj. Jen tio, kion oni trovas :

— La Rado de la monatoj kaj tagoj ;

— La Rado de la jaro kun la 4 klimatoj, la 4 sezonoj, la 4 ĉefpunktoj (ĝi entenas la nuran inan vizaĝon de la manuskripto) ;

— La Rado de la 5 cikloj de la Tero, sub formo de plurkolora klozoneigita Rozo ; ĝi malgrandigas figuras (laŭ la donitaĵoj de tiu epoko, kiu malbone konis la projekciojn) la regionojn arktan, someran, ekvinoskan, vintran kaj antarktan de la Tero.

— La skemo de la Mondo kaj de la Homo kun la kvar donitaĵoj de Hipokrato.

— La skemo de la kvar elementoj.

— Du paĝoj ilustrantaj la diversajn fazojn de Luno.



— La Rado de la 7 planedoj kun la nomo de la astroj kaj la cifero de ilia cirkla rivoluo (30 por Saturno).

— La Rado de la Ventoj kun iliaj antikvaj tradiciaj kvalifikoj. Al tiu ilustrado aldoniĝas, kape de ĉapitroj aŭ paragrafoj, svarmo da belaj literoj, kiuj montras mirindegan imagon : 62 literoj, ĉiuj malsamaj je inspiro kaj formo.

Po ĉiuj 2-3 literoj, jen vostumantaj fiŝoj, anaso-kapoj kun plumtufo, kaj kiuj mordas sin unu la alian ; jen, manĝantaj folioj-bukedojn, agloj kun hokaj piedoj ornamitaj je braceletoj ; jen birdoj kaptitaj en plektaĵoj kaj de kiuj oni vidas nur kapon kaj voston ; jen aliaj birdoj, kiuj admirigas sian anuson : jen leonoj, hundoj kun penĝanta lango ; ilia vosto estas nodita kaj finiĝas per plumfasko.

La aliaj manuskriptoj (Libro de Sta Aŭgusteno-Historio de Paul Orose) montras saman dekoracion ; tamen, la koloroj estas malpli vivaj kaj geometriaj desegnoj pli abundas. Borderaĵoj el blankaj perloj ĉirkaŭas la kadrojn, la medalionojn kaj eĉ la aŭreolon de Kristo.

Kontemplante tiujn bildojn, oni ne povas forgesi la daton : meze de la 8-a jarcento.

LA HEBREAJ MANUSKRIPTOJ

En Hispanujo, la judaj kolonioj ekzistis antaŭ la apero de Kristanismo. Ilia Ora Aĝo koincidis kun la araba konkero. En tiu tempo, certe la manuskriptoj estis tre multnombraj ; sed multaj perdiĝis laŭlonge de la historiaj eventoj.

En la jaro 300 (dato de sinodo), la hispana klerikaro rifuzis la figuran arton : nepre necesis ne distri la leganton de la esenca penso. La eksteraj ornamoj de la plej antikvaj el tiuj manuskriptoj estas tapiŝo-paĝoj lokitaj en la komenco kaj ĉe la fino de ĉiu volumo ; la unuaj tapiŝopaĝoj montras tre sobran dekoracion : geometriaj desegnoj ritme ripetitaj sur la tuta paĝo kaj inke pentritaj sur la nuda pergameno. Tio, kio karakterizas la tiaman hebrean libron estas la uzo de la skribaĵo en la dekoracio : mikrografaj literoj ĉirkaŭ la centra geometria desegno kaj grandmodulaj literoj en la kadraĵo.

En la 13-a jarcento, tiu dekoracio ŝanĝiĝas : koloraj floraj motivoj anstataŭas la centran geometrian desegnon ; estas « palmetoj » kaj akantfolioj, kiuj estis aperintaj sur la monumentoj de Damas kaj Jerusalem en la 8-a jarcento, kaj kiujn transportis la arabaj trupoj. Sed mikrografiaj borderaĵoj kaj makrografiaj enkadraĵoj pluekzistas ; orfadenetoj inspiriĝas je lignaj ornamoj skulptitaj kaj marketitaj.

En la 15-a jarcento, ankaŭ la enkadraĵo ricevas florajn motivojn. Kaj internen de la Biblia teksto oni enigas la masorojn, la kalendarojn de la moveblaj festoj, la komput-tabelojn, la kolofonon de la skribisto kaj, versigitajn, la himnojn kaj la kantikojn. Plej granda fantazio estas de nun permesata : kaj aperas bestoj realaj, imagaj, hibridaj. En la luksaj kodeksoj, la kolofono de la skribisto portas, orlitere, liajn nomon, adreson, naskiĝdaton, kaj tiujn de la mecenato.

LA LANDO DE REĜINO MAUD

Novelo de ZORJA DANOVSKAJA (fino)

Kiam Zinjo rememoris Andreon kaj la tutan sian antaŭan vivon, ĉio ŝajnis al ŝi sonĝo. Ŝi vivis ĉe l'maro. Ŝi revis pri foraj landoj. Ŝin amis Andreo. Aŭdaca maristo amis la reĝinon Maud. Sed ĉio ĉi ne estis vero, ĉio estis elpensita. Estis for de reala vivo. La reala vivo estis tio ĉi. Tie ĉi estis varmega stepo, ardigita de l'suno, kvazaŭ argila poto. En la stepo mankis akvo. Ĉe mezo de somero plende kliniĝis pitoreskaj suproj de stepaj floroj kaj herboj ; seka herbo brulvundis krurojn kvazaŭ urtiko. La homoj vivis en batalfronto. Ili leviĝis kun la unuaj sunradioj kaj okupis siajn lokojn en pezaj maŝinoj. Stepaj ŝipoj krude renversadis ŝtoniĝintan grundon. Gigantaj fosiloj ĉerpis la teron, kaj ĉiu tago antaŭenigis la kavegon de l'estonta kanalo. Tagmeza suno surrampis la alton rekte super la kapo ; la radioj torente verŝis la fluojn de fajro. Kaj foje iu, ne elteninte la fajran atakon, kliniĝis ĉe la stirrado. Sunfrapo. Tiam aperis Zinjo. Ŝi agis decide kaj nerapideme. En ŝia sektoro ne okazis gravaj akcidentoj. Ŝi gardis la homojn, kiujn oni konfidis al ŝi. Ŝi estis eta, maldika. La suno plie sekigis kaj hardis ŝin. Solece kaj ŝlosite ŝi portis en la koro sian nekuraceblan doloron, sed ŝi defendis aliajn de la doloro.

Ŝi estis ŝatata.

Tio okazis unu jaron post ŝia alveno. Ŝi memoris, kiel ŝi alvenis. Neniu riproĉis ŝin pro malfruiĝo. La homoj estis bezonataj, kaj tempo mankis por konversacioj. Oni donis al ŝi la tutan inventaron : ĥalatojn, apoteketon, bastojn kaj similaĵojn, — sidigis ŝin en laŭvojan kamionon kaj sendis ĉi-tien, en stepon. Pluen ĉio pasis ordinare. Vintro iĝis malfacile. Precipe, kiam ekblovis la terura glacia vento. Aperis frostiĝintoj. Ŝi flegis ilin ĝis resaniĝo, kiel patrino. Ŝi mem frostumis la manojn, helpante al ŝoforo, kun kiu ŝi revenis al la sektorejo, ripari la kamionon. Estis tridek gradoj, kaj ŝiaj manoj estis tro delikataj. Tion ŝi diris al neniu. Ŝi faris bandaĝojn, sulkigante la brovojn pro doloro, sed neniu eksciis pri tio. Al ĉiuj estis malfacile, sed neniu plendis.

Venis somero. Foje tagmeze la suno faligis pluvegon da blindigaj radioj sur la homojn, sur la maŝinojn, sur frakasitan teron. La maldekstra deklivo de la fosego malrapide ekrampis suben. Tie laboris homoj. Zinjo hastis en laŭvoja « Willys », la doktoro venis ĉirkaŭ du horojn poste. Dum kelkaj horoj oni helpis elfosi la kamaradojn. Neniu mortis, sed Zinjo kaj la doktoro ne dormis ; la doktoro mem faris bandaĝojn, fiksis la bastojn. Al unu grave vundita estis necesa urĝa operacio — la doktoro faris ĝin tuje en la kampo. Zinjo helpis lin preskaŭ falante pro laco. Nur kiam ĉiuj suferintoj estis feliĉe ekspeditaj en hospitalon, ŝi povis ripozi kaj restis nokti ĉe sektorejo en la tendo de l'laborestro. Iu zorgeme kovris ŝin per stebita vata jako.

Zinjo estis dekorita per ordeno. Ŝi ne sentis sin heroino : nenion ŝi faris eksterordinaran. Ŝi alpinglis la ordenon al la nova bluzo el krepjorjeto — la materialo diafana kaj facila kun intensa, ĝojŝpruca desegno, kiu plenigis ĉiujn butikojn de l'konstruloko — kaj sur la flora desegno la ordeno ŝajnis esti granda floro. Oni multe aplaŭdis al ŝi. Ŝi nenion povis diri. Ŝia portreto aperis en la gazeto. Kaj jen ĉio. Sed la doktoro, la sama, kun kiu ŝi laboris dum la elfosado, komencis skribi al ŝi leterojn. Li skribis longe kaj inspire, rakontis pri si, pri sia laboro. Li estis bona junulo kaj multon vidis. Unu fojon semajne Zinjo ricevadis koverton, en kiu nepre estis du folioj da papero, plenigitaj per etlitera densa skribo. Li skribis al ŝi pri tralegitaj libroj, pri viditaj kinofilmoj, pri homoj, pri vivo...

Sed Zinjo ne povis respondi al la leteroj. Tio ja ne estis leteroj de Andreo. Al li ŝi respondus. Same longe ŝi skribus pri la homoj, pri la vivo... La lando de reĝino Maud — kiel malproksime estis la tempo ! Andreo pensis, ke ŝi fantaziis, ke ŝi estis revulino, li eĉ ne volis ligi kun ŝi sian vivon. Ion ŝi ne komprenis tiam, ion grandan kaj tre gravan. Nun ŝi komprenus tion. Nun ŝi mem partoprenis en la granda, vera vivo. Ne elpensitaj, sed realaj estas la herooj ĉi tie, kaj ili akceptis ŝin, kiel la egalulon ; ili alte taksis ŝian etan, sed tiom fortan koron, ili donis al ŝi parton de sia gloro...

La stepo silentis. La noktoj estis longaj kaj senlunaj. Enpreminte la vizaĝon en flatan malmolan kusenon (mankis tempo por frape pufigi ĝin), Zinjo malĝojis pris la feliĉo, kiu ne plu estos. Sed tage ŝi forgesis pri tio, tage mankis tempo por pensoj pri si mem. Kiam matene en malmola kuvo de l'renversebla kamiono, kovrita per pecoj de alsekiĝinta argilo, ŝi veturis al la sektorcentro, ŝi subite eksentis sin parto de la arda seka stepo kaj de fora ĝishorizonta vasto.

Ŝi revenis en la gepatran urbon ĉe tagiĝo. Stacidome ŝi prenis taksion. Hejme ĉio estis, kiel antaŭe. Same klopodis la patrino, kaj sur la muro pendis granda mapo. La pupoj de Zinjo sidis sur la kanapo en severa, dum jaroj konstituita ordo. Ĉio, ĉio estis sama, nur Zinjo estis alia.

Vidinte la ordenon, la patrino svingis la manojn. Nenion similan skribis pri si la filino. Alvenis najbarinoj, la patrino de Andreo...

Ili demandis ŝin :

— Kien do nun, Zinjo kara ?

Kien nun ? Ŝi ankoraŭ ne sciis. La konstruo estas finita, Zinjo estas libera elekti mem sian lokon en la vivo. Por ke estu same bone ! Por fari ion grandan, necesan... Ŝi iris al la distrikta komitato de Junkomunista Ligo.

Kaj tiel okazis, ke frumatene Zinjo supreniris stuparon de l'motorŝipo, foriranta al Antarktito. Do, tamen ekzistas la lando, nomita laŭ nomo de iu reĝino, la lando, kiu logis al si Zinjon dum tuta ŝia vivo. Longa kaj malfacila estas la vojo al ĝi. Sed tio jam ne gravas.

Andreo ekvidis Zinjon frumatene. Ŝi staris, sin apogante kontraŭ la barilo kaj enpense rigardis grizan foron. Malgrasa, eta, tute knabina. Andreo komence eĉ ne kredis, ke tio estas Zinjo.

Li rememoris la amaran tagon kaj komprenis, ke li ne devis tiam foriri. Pri ĉio li kulpigis sin. Li skribis al ŝi, longajn leterojn, sed neniun forsendis. Sen Zinjo io mankis en la vivo, io tre granda...

— Zinaida Nikolajevna, oni petas vin, — alparolis Zinjon iu junulino.

— Mi iras, — respondis Zinjo.

Kaj ŝi preteriris Andreon tute apude, jam aĝa, serioza kun meditema rigardo de l'grizaj okuloj ŝi ne rimarkis lin.

Malfrue vespere Andreo frapis la pordon de l'kajuto de Zinjo. Knabino, kun kiu loĝis Zinjo, estis deĵoranta, kaj Zinjo solis.

— Saluton, Andreĉjo, — diris Zinjo. Ŝi salte leviĝis de la lito, kie ŝi kuŝis kun libro. Kaj Andreo ĝene staris en la pordo.

— Sidiĝu, — diris Zinjo. Ŝi ne eldiris miron. Tiel devis esti. Nun la tuta mondo, ĝis la plej malproksima, kaŝita en neĝoj, Lando de reĝino Maud, apartenis al ŝi, kaj si devis venki.

— Jen neniam mi pensus, ke vi kapablas iri al Antarkiko ! — ne sen malico diris Zinjo. — Tio ja estas romantiko, fantazio, deliro.

Nun estis ŝia tago, kaj ŝi volis iomete turmenti Andreon. Sed li regardis ŝin kaj ne povis rekoni ŝian voĉon, nek ŝian manieron de sinteno al li, kvazaŭ al infano...

— Mi iras, ĉar min sendas la Patrujo, — diris Andreo. — Neniu romantiko, neniu fantazio. — Kaj li ekridetis. — Mi, verdire, neniam pensis, ke vi estas kapabla ŝipi al Antarktiko. Mi pensis, ke vi povas vojaĝi nur sidante hejme sur kanapo. Mi estas fiera pro vi, Zinja.

Ili eksilentis. Ili ne havis, kion diri pli. Andreo, ruĝa pro konfuziĝo, sidis sur seĝrando kaj frotis la kaskedon. Zinjo ne sciis, kion fari. Kaj ŝi komencis rakonti. La vortoj fluis facile. Ŝi rakontis pri stepaj ŝipoj, pri peza, akvoplena argilo disrampanta sub la piedoj dum pluvoj, pri knabinoj, forveturintaj al la konstruo, pri novaj ŝoseoj, pri la granda kanalo. Ŝi metis sur la tablon siajn delikataj fingroj kun hardita haŭto, kaj Andreo volis kisi la fingrojn.

Ĉu oni povas kompreni : « Pro kio oni amas lin ? mi ne scias. Neniam mi sciis. Ĉiam mi amos. Batalos. Verŝajne, mi estas forta. »

« Eble, oni povas ankoraŭ revenigi tion ? » — pensis Andreo, atentante sonojn de ŝia voĉo.

Kaj Zinjo subite eksilentis. Ŝi rememoris sian doloron, sian solecan, ĉiaman doloron. Sed Andreo sidis apude, kaj ne estis loko por ofendo en ŝia koro.

Venis post la deĵoro la najbarino de Zinjo. Andreo foriris el la kajuto. Li iris sur la supran ferdekon. Estis silento. Obtuze bruis la maŝinoj. Nigralake flagris la maro.

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO

Krucvort-Enigmo

	A	B	C	D	E	F	G	H	I
1	K	A	O	S	■	E	T	A	P
2	I	S	K	I	A	T	I	K	O
3	E	T	■	A	R	A	■	R	E
4	S	E	M	■	O	■	R	O	T
5	■	R	O	Z	■	M	U	S	■
6	M	I	T	■	I	■	U	T	A
7	I	S	■	I	L	E	■	I	G
8	E	K	O	N	O	M	I	K	O
9	N	O	J	O	■	A	S	O	J

NOVAJ PROBLEMOJ

Inter Liverpulo kaj Novjorko

El la haveno de Liverpulo ĉiutage foriras unu ŝipo al Novjorko kaj alvenas tie post 8 tagoj. Simile el la haveno de Novjorko ĉiutage foriras unu ŝipo kaj post 8 tagoj alvenas en Liverpulo. La ŝipoj sur la maro unu post la alia renkontiĝas. La demando estas : unu ŝipo kiom da ŝipoj renkontas dum la veturo inter la du havenoj ? Ĉiu ŝipo ekiras precize je tagmezo kaj alvenas precize je la 3a horo posttagmeze.

Trovu la frazon

La solvo konsistas el 70 literoj. Ĉiu nombro signifas unu literon.

21, 48, 53, 13, 58, 70 = nomo de mondparto.
41, 6, 19, 33, 65, 39, 36, 59 = dolĉa manĝaĵo.
16, 27, 24, 35, 36, 10 = la kelnero iras tiel.
2, 63, 15, 17, 49, 28, 12, 6 = longnaza besto.
34, 25, 40, 14, 37, 50, 33 = parto de la tago.
18, 1, 52, 22, 26, 8, 60, 32, 6 = la plej facila lingvo.

69, 57, 67, 70 = trinkaĵo.
11, 66, 7, 47, 62, 20, 42 = ne paroli.
9, 61, 55, 43, 28, 36, 59 = parto de la horo.
38, 51, 3, 64, 23 = ne mortis.
56, 45, 68, 33 = parto de la monato.
46, 54, 31, 29, 70 = sinjoro kun granda apetito.
58, 16, 30, 62 = nombro.
44, 4, 43 = montra vorto.
1, 70 = grava regulo por novaj esperantistoj.

Ĉu vi bone kalkulas ?

Skribu ĉiun numeron de 1 ĝis 15, uzante ĉiufoje kvin ciferojn 4, ne pli, ne malpli, kaj ĉiujn signojn laŭbezone.

Ekzemple :

$$4 - \frac{(4+4+4)}{4} = 1$$

GRAMATIKO PER BONHUMORO

DIFERENCO INTER EPITETO KAJ PREDIKATIVO

Epiteto montras ekzistantan nediskuteblan veron :

— mi rigardas la statuon nudan (kiu estas nuda),
— mi vidas la knabojn ludantajn (kiuj ludas).


(La Epiteto povas antaŭi la substantivon : la nudan statuon — la ludantajn knabojn).

Predikativo montras niajn propajn konstatojn, asertojn, aŭ okazan : staton, okazigitan de la ago men (ŝi dancis nuda).

(Oni povas anstataŭigi la predikativon per Ke-propozicio)

— mi trovis la laboron malfacila, sed vi trovis ĝin facila
(ke ĝi estas facila),
(estas mi, kiu trovis ĝin malfacila, sed vi malsame opiniis),
— mi opiniis tiun homon honesta, sed la juĝisto diris lin malhonesta,
(mia opinio kaj tiu de la juĝisto ne estas samaj).

Frandaĵo




— Ne timu ! Vidu, kiel nia Fifi ĝoje kuras kaj bojas al tiu abundo-korno, kiun ĝi sensas plej bongusta !

Kompleksa problemo



— Kun okulvitroj aŭ sen okulvitroj mi ne scias ĉu mi devas konsideri vin miopa aŭ presbiopa aŭ mensokaduka.

— Sed komprenu : mi devas meti la okulvitrojn por ekzameni la signojn kaj ilin formeti por serĉi tradukon kaj pronuncon en la vortaro.



Ĉu bona aŭ nebona vi kredas tiun farmanieron ?

— Ne nur multekosta sed ankaŭ malfacila mi opinias tiun fotadon. Malgraŭ miaj klopodoj povas esti, ke miaj amikoj trovos tiun foton tute ne bona : precipe se mankas kapo kaj piedoj.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (120 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (220 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (2,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (35 kr.)

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, Donnerink 10 C 20 05800 **Hyvinkää** (23 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk Frankfurt (M) 2347 59-601 (15 mk.).

Hispanujo : S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (320 pes.)

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (2 500 lires).

Japanujo : S-ro Tara Nisiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (80 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (15 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (30 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 393 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (24 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro Jones R. Kent, 3318 N. Lake Shore Drive, n° 801, CHICAGO, Illinois 60 657.

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respond-kuponoj (20 respk.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 3 - 4 de 1977, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

La lecture de comptes rendus de réunions du Conseil d'administration ou de l'Assemblée générale vous a mis au courant du problème qui se pose pour nous lorsqu'un sociétaire décède et que ses héritiers, dont nous ignorons et le nom et le domicile, ne se manifestent pas. Certains sociétaires des premiers jours nous ont proposé une solution, qu'ils ont fait entrer dans les faits avec notre accord. Il s'agit dans leur esprit à la fois d'affirmer l'attachement à la Maison Culturelle qu'ils ont concrétisé par l'acquisition d'une ou de plusieurs parts de sociétaire et aussi d'éviter que ce témoignage de leur soutien ne se perde si les héritiers ne s'intéressent pas à l'esperanto. Les uns nous ont envoyé une lettre exprimant leur désir que la ou les parts qu'ils possèdent soient transformées en don au bénéfice de la M.C.E. à leur décès. D'autres nous ont simplement renvoyé le certificat qui leur avait été remis, la transformation en don pouvant se faire à leur décès ou dans l'immédiat. Dans ce dernier cas, le sociétaire continue à être membres de la coopérative et à recevoir chaque année sa convocation à l'Assemblée générale. A tous ces amis nous tenions à dire merci.

Depuis le 10 mai, nous n'avons plus une seule place libre pour la première période d'été et très peu pour les deux autres périodes. Nous avons du refuser de nombreuses demandes d'inscription. De nombreux stagiaires viendront de pays étrangers. Succès de participation sans aucun doute, comparable à celui de 1976. Espérons que l'intérêt que prendront les participants aux activités sera également grand ; cela dépend des organisateurs, bien sûr, mais aussi des participants eux-mêmes, participer ne devant pas être un vain mot. Il ne doit pas y avoir le petit groupe des animateurs et le grand groupe des « animés ». Il n'y a de contacts fructueux que s'il y a échanges, si chacun est appelé à donner aussi bien qu'à recevoir. C'est cela qui fait l'originalité de l'ambiance grésillonnaise.

P. BABIN.

LA REVUE

« Kulturaj Kajeroj » semble plaire. C'est du moins ce qui ressort des lettres que nous recevons de France et de l'étranger après chaque numéro. Mais le nombre des abonnés semble plafonner. Il faut absolument que ce nombre augmente. Nous ferons le service gratuit d'un numéro aux adresses que vous nous enverrez. Abonnez les amis auxquels vous voulez faire plaisir. Et payez votre propre abonnement au plus vite. Merci.

ABONNES BIENFAITEURS

1976

S. Amariglio (92)	30,00
H. Rambouillet (81)	30,00
A. Stutzmann (68)	30,00
P. Poulain (62)	30,00
E. Joly-Demol (80)	30,00
L. Bossuet (33)	30,00
J. Katso (Japon)	30,00
H. Kuriyama (Japon)	30,00
H. Fitzon (All féd.)	35,00

1977

A. Raulet (44)	30,00
R.-J. Marmou (77)	30,00
G. Offroy (57)	35,00
R. Rion (76)	30,00
C. Moreau (06)	30,00
H. Ferez (06)	30,00
M. Reynaud (84)	30,00
S. Reynaud (84)	30,00
A. Thierrat (75)	30,00
M. Sol (33)	30,00
M. Cléchet (06)	30,00
R. Mauchien (80)	30,00
A. Hervouet (92)	30,00
R. Hénaux (92)	30,00
R. Durand (88)	30,00
G. Martinez (16)	50,00
R. Watier (92)	30,00
A. Roullet (35)	30,00
P. Quillaud (76)	30,00
G. Hébert (76)	50,00
P. Gitton (18)	30,00
H. Chaire (33)	30,00
L. Bossuet (33)	30,00
A. Bricard (75)	30,00
D. Truc (84)	30,00
M. Rousselle (44)	30,00
M. Duvigneau (45)	30,00
F. Lo Jacomo (75)	30,00
Bona Stelo (26)	30,00
M.-L. Boinier (91)	30,00
J. Vazon (79)	30,00
J. Flach (Pays-Bas)	30,00
A. Slot (Pays-Bas)	30,00
A. Despeyroux (69)	30,00
R. Cash (78)	30,00
G. Vandelli (Italie)	90,00
B. Cheverry (49)	30,00
G. Ciret (49)	30,00
S. Kremlackova (Tchéc.)	30,00
F. Lanz (93)	30,00
R. Despiney (94)	30,00
J. Tuffier (93)	30,00
A. Chalm (76)	30,00
M. Marquis (35)	30,00
G. Coppens (Pays-Bas)	30,00
Total	**1.760,00**

NOS PEINES

Nous avons appris avec consternation le décès de Mme Dairon, mère de notre ami Guy Dairon. Les habitués de Grésillon connaissent bien Guy Dairon dont le dévouement a été apprécié par tous au cours des stages qu'il a dirigés.

Nous présentons à Guy, ainsi qu'à son père nos bien sincères condoléances, et nous les assurons de toute notre sympathie.

Pendant les mois d'hiver,
vous avez utilisez avec satisfaction
notre

LIBROSERVO

N'oubliez-pas qu'il fonctionne
aussi pendant l'été

M. Ciret, " La Timeraie " Vieil-Baugé, 49150 Baugé

Pensez à vos cours d'automne,

n'attendez pas,

commandez tout de suite :

" POR LA PRAKTIKANTOJ "

18 francs

Réduction à partir de 10 volumes

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon :	
noires :	0,60 F.
couleur :	0,80 F.
Cuillères de colection :	13,00 F.
Pendentifs :	12,00 F.
Disques de stationnement :	4,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	2,00 F.

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 20 Fr.
Demandez notre catalogue

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de P. Babin

Prix : **18,00 Fr.** + Frais d'envoi

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE CATALOGUE

...aujourd'hui

Quelques livres d'Edmond Privat

Vivo de Zamenhof (10 frs)
Aventuroj de pioniro (12 frs)
Junaĝa verkaro (10 frs)
Karlo (3,50 frs)
Vivo de Gandhi (12 frs)